# LA PACDEFENDANTO

N-o.38. NEREGULA INFORMA CIRKULERO POR ĈEĤOSLOVAKIO Februaro 1955

## AL NIAJ POPOLDEMOKRATAJ GEK-DOJ!

Post la renaskiĝo de nia movado sub la losungo "Per Esperanto por la mondpaco" ni sukcesis veki ankaŭ multajn samideanojn en la ceteraj Popoldemokratioj.La ĉeĥoslovakaj gek-doj prenis je si la devontigon instrui kaj instigi vin,imiti nian ekzemplon kaj reaktivigi ankaŭ en viaj landoj nian movadon.

En tiu ĉi senco ankaŭ nia redakcio dum tri jaroj distribuas sian bultenon al viaj landoj por informi vin pri ĉiuj novajoj okazigintaj en nia lando kaj ankaŭ pri tiuj kiuj okazis en aliaj kaj pri la movado en viaj propraj landoj, pri kiu vialandaj aktivaj k-doj sendas al ni raportojn. Videble ni faras ĉion,kion ni povas,por almenaŭ morale subteni vin en via laboro.

"LA PACDEFENDANTO" mem,en viaj manoj,estas argumenta propagandilo kontraŭ la hipokritaj atakoj celantaj subpremi nian lingvon. Estas necese,scii ĝin plene kaj gustamomente eluzi. Ankoraŭ multe pli trafa argumento estas la organo de la Mondpaca Esperantista Movado, "PACO",kiu montras klare,ke ne la rusa lingvo estas la lingvo de tutmondaj pacdefendantoj,sed praktike,unusole,ĝi estas Esperanto.Jen faktoj,kiuj sufiĉe klare parolas kaj kiujn necesas prezenti al ĉiuj nesciuloj.

Niaj popoldemokrataj gekamaradoj devas ankaŭ konsciiĝi pri la grava sukceso,kiun atingis Esperanto en la lasta konferenco de UNESKO,kiu okazis en Montevideo,kie 30 ŝtatoj kontraŭ nur 5 aprobis Esperanton kiel Universalan mondlingvon kaj inter la 17 kiuj sin detenis de la voĉdonado troviĝis la Sovjetunio kaj la popoldemokrataj delegitoj. Konsekvence,la lastaj,sin deteninte de la voĉdonado,submetiĝas sin same kiel la 5 kontraŭvoĉdonintoj al la decidoj de la demokrata plimulto.

Certe,ke la popoldemokrata bloko,kies delegitoj ne kontraŭis Esperanton,sed tamen aspiras enkonduki la rusan lingvon por siaj internaciaj rilatoj,ne tro emos pri tiuj faktoj laŭte paroli en siaj hejmlandoj. Ĝis nun ankaŭ la nacilingva gazetaro nur menciis la sukceson,ke oni decidis uzi en UNESKO ankaŭ la rusan lingvon.Sed fakto restas tamen fakto kaj niaj gek-doj ĝin devas mem disvastigi. Vi ankaŭ ne povas atendi nun, ke viaj registaroj jam petos vin fondi organizitan Esperanto movadon kaj viaj ministroj por kulturo k. instruado rapidos ĝin enkonduki devige al ĉiuj,vialandaj lernejoj.

Sed pri unu fakto vi povas esti certaj,ke oni absolute jam ne kuraĝos malpermesi al vi labori per Esperanto por la mondpaco,kaj se vi por tiu celo bezonos organizi rondetojn,grupojn kaj komitatojn, kaj eldonadi cirkulerojn,por kio vi eble ankoraŭ ne ricevus oficialan permeson,oni vin ankaŭ ne punos,se vi tion arangos sen tia aprobo.

La nombro de niaj abonantoj en viaj landoj konstante kaj rapide kreskas.Nia redakcio ne povas daŭre al vi liveri sian eldonajon sen ia ajn rekompenco,ĉar niaj propraj abonantoj devas tion pagi. Estas jam tempo,ke vi lernu el niaj spertoj kaj klopodu eldoni proprajn organojn. Ni estas pretaj eĉ kontraŭ ricevo de tre modesta bulteno el via lando,rekompence liveri la saman kvanton de la nia.Niaj legantoj havas grandan

inereson ricevi informajn bultenojn el Polio,Hungario,Bulgario,DDR ktp. Ni facile abonigos tiujn al nialandaj gek-doj kaj tiamaniere ni povus almenaŭ parte egaligi niajn elspezojn. Kelkaj aktivaj gekdoj el viaj landoj jam dum tri jaroj promesas imiti la ĉehoslovakan ekzemplon,sed nun jam la tempo venis kaj ni ne volas plu atendi.

Ni de nun,krom kelkaj esceptoj, liveros nian organon nur al la perantoj de la koncernaj landoj,kiuj distribuos ĝin al la unuopaj abonantoj kontraŭ pago de fiksita jarabono.Tiujn sumojn niaj perantoj uzos por parte rekompenci laŭ eblecoj nin per libroj kaj broŝuroj, dume la alian parton ili uzos por propagandaj kaj organizaj celoj en sia propra lando.

Ni kredas,ke la nunaj perantoj kiel eble plej baldaŭ farigos gvidantoj de sia landa movado kaj ni ankaŭ esperas,ke la tieaj abonantoj,al kiuj ni ĝis nun senpage liveris nian bultenon,jam grave kaj efike kontribuos kaj kunlaboros kun tiuj,por finfine restarigi la movadon ankaŭ en siaj landoj kaj povi rekompenci niajn legantojn en Ĉehoslovakio per eldono de propraj bultenoj.

Nia bulgara peranto k-do.B.A. Velev ekzemple skribas: ke li eĉ ne povas eldoni aliĝilon por "MEM",ĉar mankas al li skribmaŝino kun latinaj literoj.Kaj nia redakcio jam ricevis kelkfoje leterojn de bulgaraj kamaradoj skribitajn per tia maŝino. Estas necese,ke niaj perantoj ankaŭ iom pli aktive kaj pli ofte kontaktu kun la diverslokaj sialandaj esperantistoj,kaj ili certe ne nur trovos skribmaŝinon, sed ankoraŭ plurajn eblecojn,pri kiuj ili ĝis nun ne sciis. La perantoj ankaŭ foje devas kunvenigi ĉiujn siajn abonantojn kaj al ili konatajn esperantistojn al iu konvena urbo aŭ loko,por povi kun ili persone pridiskuti ĉiujn problemojn kaj malfacilaĵojn kaj interkonsili kielmaniere solvi kaj forigi ilin.La perantoj mem ne povas restarigi vian movadon, se ne vi ĉiuj al tiu celo kontribuos per ĉiuj fortoj.

Unuopa,izolita persono nur tre malfacile sukcesas, sed se vi kun komunaj fortoj,unuigite tiros la ĉaron,tiam vi ĉiuokaze trovos la ĝustan vojon kaj certe vi ĉiujn ĝisnunajn malfacilaĵojn facile kaj baldaŭ venkos.

R.Burda

## L E T E R O A L L A E S P E R A N T I S T O J

Verdstelulој karaj kaj senlacaj,
dissemitaj ĉie en la mond',
helpu al klopodoj niaj pacaj
kune kun por paca via rond.

Nin timigas militinstigantoj
per teruro de l'atoma bomb',
sed iliaj revoj restos vantaj -
ili mem troviĝos en la tomb.

Vokas nin saviĝo de MONDPACO
kaj vi venu urĝe,sen hezit',
por forigo nepra de l'minaco
timigante nin per la vizit.

Karaj samcelantoj en luktado,
batalantoj de soci-justec',
por ke plu ne estu militado,
kontribuu vi per tutspertec'.

Por ke povu ŝtatoj kunloĝadi
sendepende de socia ord',
devas ni,tutforte kunigadi,
al nulig de l'ajna malkonkord'.

Verdstelulој karaj kaj senlacaj,
dissemitaj ĉie sur la ter',
helpu al klopodoj niaj pacaj
por finvenko de la pac-afer !

Dediĉis por nia bulteno,k-do.: MURGIN Canko
Kvartalo Malĉika 41,SOFIA-29,Bulgario.

En nia migranta biblioteko jam troviĝas multaj interesaj libroj, la plejnovaj japanaj,ĉinaj,svedaj kaj aliaj eldonaĵoj,ankaŭ la BABTO DE CARO VLADIMIRO,historiaj,lingvosciencaj kaj amuzaj verkoj. Petu katalogon ĉe: K-do.Alois ZMEŠKAL, Celetná č.2, PRAHA 1.

TUTŠTATA KUNVENO DE ESPERANTISTAJ PACDEFENDANTOJ

Jam ni povas al niaj legantoj diri, la lokon, kie nia kunveno okazigos. Ĝi estos en OTROKOVICE ĉe Gottwaldov/Moravio/.

200 gekamaradoj el diversaj lokoj de nia lando, kunvenintaj la 8-9.de januaro en komuna konferenco de la regionoj Ostrava k. Olomouc, proponis arangi nian unuan kunvenon en Otrokovice. Jam estis komisiitaj k-dinoj Evjáková kaj Matušová por esplori la plej konvenan tempon por la aranĝo rilate la loĝadon kaj manĝadon. Niaj gekamaradoj en Otrokovice elektos nun la preparkomitaton kaj en la venonta n-o. ni tre verŝajne jam povos diri al vi la daton de la kunveno kaj la funkciulojn de la preparkomitato. Jam proponis sian helpon kelkaj k-doj el aliaj lokoj, inter ili ankaŭ profesoro Kožený el Kutná Hora, kiu pretas oferi sian libertempon, por aktive helpi al la preparkomitato en Otrokovice.

Estus nun tre dezirinda, ke la preparkomitato decidu la aranĝon eble dum la generala libertempo kaj dense antaŭ aŭ post la tutŝtata gimnastika SPARTAKIADO, okazinta en Praha. Tio estas rekomendinda, ĉar multaj niaj eksterlandaj gek-doj havos la eblecon facile ricevi enirpermeson por viziti la Spatakiadon kaj samtempe ili havos okazon partopreni nian kunvenon. Multaj jam esprimis sian intereson. Tio certe signifus ĝojigan renkonton kaj tute sinceran fratan diskuton pri ĉiuj problemoj, kiujn ne eblas per korespondado solvi. Niaj diverslokaj gek-doj jam nun arangu fonduson por la vojaĝelspezoj kaj instigu unu la alian al intensiva ŝparado, por ke kiel eble ĉiu k-do kaj k-dino povu partopreni tiun ĉi nian unuan interesan, ĝojigan kaj entusiasmigan renkontigon.

FAKAJ KUNVENOJ:

K-do.MUDr.J.Černý el Plzeň gvidos kunvenon por kuracistoj, medicinistoj kaj fakaj hospitalaj kaj sanatoriaj laborantoj.

K-do.Zdeněk Škvrna, Dvořákova č.7, Ostrava, gvidos kunvenon de MEM-junularo kaj junaj pacamikoj.

K-do.Dušan Kostolný, Strojáren, Gelnica, Prakovce, gvidos kunvenon de slovakaj esperantistoj koncerne propagandon kaj reaktivigon de la slovaka Esp-movado.

K-do.Alois Zmeškal, Celetná 2, Praha I. gvidos kunvenon por bibliotekistoj kaj literaturamantoj.

PROPONOJ:

K-do.ing.B.Guttmann, Běhánky-Teplice lázně, p.Horská Bystřice proponas al diskuto, ke nia venonta tutŝtata kunveno okazigu en ĵu urbo de Slovakio kaj en 1957 ĝi estu en Bohemio.

CENTRA KONSULTA KOMITATO POR LA ESPERANTO RONDETOJ EN ČSR

Dum la komuna konferenco en urbo Olomouc 200 partoprenintoj trovis necese fondi provizoran tutŝtatan konsultan komitaton por konsulti k helpi al la Esp-rondetoj kaj izolulojen nia lando.

Por tiu komitato estis elektitaj:

Prezidanto: k-do.Rudolf Burda, Plzeň

Sekretario: k-do.Rudolf Miloš, Wanklova č.14, Olomouc,

Kasisto: Fabián Karel, Komenského 22, Olomouc. Ceteraj komitatanoj estas: F.Matušová-Gottwaldov, Ant.Odehnal-Karviná, Fr.Pytloun-Liberec, Lamačka Ján-Trenčín, d-ro.Vl.Mohapl-Olomouc, Fr.Lička-Ostrava, V.Špůr-Doksy, Josef Vondroušek-Brno, Kuzník Jar.-Opava, prof.J.Kožený-Kutná Hora, R.Hromada-Praha, R.Slaný-Ostrava, Kočvara-Ostrava, Kořínek-Brno, Jurka-Příbor kaj k-do.Th.Kilián.

Tiu komitato havos la taskon konsili kaj helpi laŭ ebleco kaj spertigoj al niaj grupoj kaj izoluloj, kiuj tian helpon bezonos kaj postulos. Ĉiuj instigoj, petoj kaj proponoj estu direktotaj al la sekretario Esperantský zájmový kroužek při ZK-ROH.Hospodářský podnik města Olomouce, Náměstí Rudé Armády, Olomouc. Ĝi en kontakto kun la ceteraj komitatanoj la aferon klopodos arangi.

La komitato eldonos apartan cirkuleron, por informi vin detale pri nia Esp-movado en ČSR. Ĝi estas abonebla kontraŭ pago de 10.-Kčs ĉe s-ano.J. Lamačka, Pod Sokolicami 1675, Trenčín

Nia E.K. definitive decidos programon.

ALVOKO

pri arangota mondmitingo de reprezentantoj de ĉiaj fortoj porpacaj.

En la mondo kun gravaj ebloj konservi la pacon,montrigas novaj dangeroj,kiuj povas neniigi ĉiujn tiajn eblecojn.

Nur potenca movado,kreskiganta el la popoloj mem povas malhelpi la dispartigon de la mondo je sinkontraŭantaj formajoj,malebligi la restarigon de armeoj,kiuj sekvigis tiom da larmoj kaj malgojo,kaj la homaron liberigi de la premantaj ŝarĝoj de armebudgetoj.Ĉi tiu potenca movado sola povas garantiila kunlaboradon de la nacioj por la konservado de ilia bonstato,ilia sendependeco kaj ilia komuna sekureco.

La Monda Packonsilantaro solene alvokas ĉiujn fortojn de la paco,ĉiujn virojn,ĉiujn virinojn kiuj deziras vivi liberaj de la malamo kontraŭ aliaj popoloj.Ĝi vokas ilin kunigi siajn klopodojn,antaŭ ol estos tro malfrue.

Tial ĝi decidis kunvoki grandan mondmitingon de reprezentantoj de ĉiaj fortoj de la paco por la dua duono de la monato majo 1955.

Tiu ĉi mondmitingo de pacaj fortoj tr verŝajne okazigos en Helsinki kaj niaj,tieaj gek-doj. jam nun garantias al partoprenontaj esp-istoj senpagan logadon kaj mangadon. Dependas nun de ĉi -uj Esp-organizoj,ke ili klopodu ĉe siaj landaj kaj lokaj naciaj packomitatoj pere de aktiva kunlaboro akiri la eblecon partopreni kiel esp-delegito tiun ĉi mondmitingon. La rezultoj de tiu agado estu komunikota al la landaj MEM-perantoj,kiuj ilin resume sciigu rilate centran organizadon al nia gen.sekretario,k-do Anton BALAGUE,Kirchenweg No.12, SANKT POLTEN,Aŭstrio.

D-ro.Ad.HALBEDL,Lud.BURDA
Paavo HEIKKINEN.

HELPU LA PACLABORON EN HUNGARIO

Je fino de februaro okazigos en Budapest la 4a Hungara Landa Packongreso.Sendu tiuokaze al la landa Packonsilantaro,Országos Béketanács,Sztálinut.124,BUDAPEST VI. mallongan salutleteron esprimante, ke en la porpaca laboro kaj kontraŭ la rearmigo de Germanio ĉie solidare kaj energie partoprenas la esp-istaj pacdefendantoj, serĉante ankaŭ plifortan kontakton kun la hungaraj pacamikoj per helpo de Esperanto.La kongreso prikonsideru kaj apogu tiun laboron!

Eĉ se oni ne pritraktos viajn proponojn,la alveno de leteroj el multaj landoj,precipe de MEM reprezentantoj kaj esp-pacdefendantoj povas multe utili.

Simile sendu sciigojn pri junulara movado,porpaca kaj kultura laboro al la Revuo de Demokrata Mondjunularo,kiu sidejas nun en:Világ Ifjusága,redakt. Benczur-u.34,BUDAPEST VI,Hungario. La red.ricevis hazarde eksterlandan Esp-revuon kaj de mi poste kelkajn n-ojn de "PACO"je tio ĝi serioze interesigis jam ĉe k-do.Lájos MÁRTON pri Esp-o. Multaj leteroj kaj demandoj eble helpus la arangon de esp.junulara kunveno ĉe la Junulara Mondfestivalo somere en Varsovio Petu ankaŭ multnombre per Esp-o korespondantojn.

Pál BALKÁNYI

GERMANIO REAKTIVIĜAS

Nian redakcion atingis salutletero,subskribita de 18 germanaj esp.pacaktivuloj,kiuj el diversaj lokoj kunvenis en DRESDENO al konsulta kunveno,kie ili pritraktis la reaktivigon de la landa Esp-movado sub la devizo: PER ESPERANTO POR LA MONDPACO ! Pli detalajn raportojn ni ankoraŭ atendas.

OTROKOVICE RESPONDAS

La informoj kaj rimarkigoj en via letero al ni plene konvenas kaj ni aprobas ĉion,kion vi en la letero menciis.

Nia Esp-rondeto ĉe la Uzina klubo de la nacia entrepreno SVIT en Otrokovice pretas arangi en sia urbo Otrokovice la TUTŜTATAN KUNVENON DE ESP-PACDEFENDANTOJ kaj konsideras kiel grandan honoron,ke oni elektis Otrokovice kiel plej konvenan lokon por tiu ĉi celo.Por la daŭro de la kunveno ni certigos la logadon,mangadon,ejon por Esp-ekspozicio kaj ejon por arango de fakaj kunvenoj. Sed necesas,ke ni eksciu kiel

eble plejfrue la precizan daton kiam la Tutŝtata kunveno devus okazigi,kiom da tagoj gi daŭros kaj la plejverŝajnan nombron de partoprenontoj.Tion ni devas 4-5 monatojn antaŭe anonci al la estraro de la hotelo,por ke tiu povu al ni garantii rezervadon de logejoj,mangadon kaj kunvenejojn. Ni ankaŭ konsentas,ke la kunveno havu la proponitan titolon: "TUTŜTATA KUNVENO DE ESPERANTISTAJ PACDEFENDANTOJ"tion ni ankaŭ sciigis al nia Uzina Klubo.

La materialojn por la ekspozicio prizorgos Helpa komitato, kiu ankaŭ zorgos pri arango de kunvenoj kaj aliaj laboroj.

Ekestos laboro ne malgranda, sed ni kredas,ke ni nian taskon solvos al la kontenteco de ĉiuj. Ni ja ne restos solaj,ĉar por la sukcesplena procedo de nia Tutŝtatakunveno kontribuos preskaŭ ĉiuj fidelaj esperantistoj.

Fine ni parte jam rekompencas la al ni dediĉitan honoron per aligo de 10 novaj abonantoj.

Otrokovice la 26.1.1955.
Fany Matušová kaj A.Evjáková
OTROKOVICE, Krátká č.812.

PER MONDA SOLIDARECO AL VENKA HUMANECO!

Scii Esperanton kaj korespondi nur amuze,estas malmulte kaj unuflanka.Per Esperanto ni devas senti kaj labori.Tio signifas antaŭ ĉio,ke ĉiu honore batalu por la bono kaj justeco.Tiamaniere necesas kompreni la testamenton de d-ro.Zamenhof.

Veraj esperantistoj estas la unuaj pioniroj de amikiga mondo kaj tial ankaŭ en la unuaj vicoj de la morala batalo por daŭra mondpaco. Ili scias plejbone ke la harmonio de kunlaboro ne konas limojn kaj ili estas konvinkitaj pri tio,ke internacia lingvo estas la plej bezona ponto,hodiaŭ ankoraŭ malmulte uzata,sed en la estonto nepre necesa.

Ni bone scias,kio malhelpas al daŭra progreso kaj feliĉo en la mondo.La dangero de minacantaj militoj havas timegajn okulojn!

Certe la grandega plimulto malamas ĉiun militon,ĉar milito alportas nur ruinigon,mizeron kaj sennezuran turmenton. Ĉu dubus iu pri tio,ke ĉiu milito estas plej abomena krimo kaj samtempe la plej granda honto por la tuta civitanaro? Ĉu ne estas la plej terura malsaĝo oferi milionojn da senkulpaj vivoj kaj miliardojn da laborvalorojn por la profitoj de sangavidaj ekspluatantoj? Estas vera, ke la kulpo estas ĉiam ĉe la atakantoj,sed estas ankaŭ vera,ke samtempe kunkulpas la cetera indiferenta mondo,kiu ne detruas la malbonon en sia germo kaj ordinare nur observas la agonian batalon de la atakitoj.

Ne eblus komencigi militon,kiu estus ankoraŭ pli terura ol la pasintaj,se firma solidareco regus inter ĉiuj nacioj.La estontaj generacioj,kiuj estos pli prudentaj ol ni,ili miros,kiaj homoj vivis en la dudeka jarcento,homoj teruraj kaj tre malfortaj,kiuj tiom nehumane agis kaj permesis krimegojn fari. Ĉu ne kaŭzas tia penso malgojon en via animo?

La tuta homaro devas konsciigi pri sia senlima forto!Ĉiuj progresemaj organizoj kaj nacioj devus unuigi en internacian union. Tia komuna grandega forto decidus la bonfarton de ĉiuj nacioj.Ĉio kres kas kaj konstruigas el malsupre supren,neniam male! Nur la popola potenco de mondsolidareco povas certigi la sopiratan daŭran mondpacon per internacia lego.Tia lego malebligus kaj esceptus en nova historio de nacioj ĉiun militon kie ajn,ĉar konfliktojn solvi per perforto ne plu estus konvena metodo por morala venko.Homo ja estas perfekta kreajo kaj ne obeema materialo,kiu devas detrui, murdi kaj lasi sin mortigi! Heroeco estas nur en konstruado kaj konkurado,sed ne en kruela frenezeco de militoj!Mi vokas vin,ĉiujn Laboru por la mondpaco en viaj organizoj,postulu internacian legon por daŭra paco kaj voku viajn radiostaciojn al tia komuna laboro!

Belega,libera mondo,sen malamo apartenas al ĉiuj optimistoj,al ĉiuj honestaj homoj,kiuj scios krei sub la kanto de PACO sian feliĉan estonton, Vladimír MALÝ-Hořice

MALJUNULOJ RESTAS JUNAJ

Tio vidiĝas el jena letero kiun ricevis nia redakcio:

Kara kamarado! Nové Strašecí la 10.1.1955.

En ĉi tiu letero mi kunsendas 25.-Kčs kiel pagon: 12.-Kčs por LA PACDEFENDANTO, 13.-Kčs por la PACO. Temas pri jarabonoj por 1955.

Ni/mi kaj mia edzino/tre ĝojas pro la komencanta sukceso kaj progreso de la afero "PER ESPERANTO POR LA MONDPACO".

Domaĝe nur, ke ni ambaŭ ne povas partopreni pli en la laboro. Ni estas jam maljunaj, mi pli ol 75 j. kaj la edzino pli ol 69 jaroj, krome ni ne estas tute sanaj.

Sed, malgraŭ ĉio, ni agitadas por Esperanto, kie nur okazo estas, ĉie kaj ĉiam. Al vi, agitulo kaj aktivuloj ni deziras plenan sukceson en via peniga kaj oferema laboro.

Kun kamaradaj salutoj, geedzoj V.k.S.HEJDA, Okružní č.636, N.Strašecí u Kladna.

Rim.de red.: Jen multaj gejunuloj povus preni ekzemplon de tiuj ĉi du maljunaj pioniroj, kiuj per Esperanto fariĝas daŭre junaj!

PRI GRAVA REFERENDUMO

La ĉi suban artikolon ni pro ĝia fakta GRAVECO kopias el bulteno „S A T - A M I K A R O ".

Verŝajne, ĉiu SAT-amikarano jam pli malpli aŭdis pri C.N.R.G.O. kaj eĉ konas ĝian monatan organon "Voie de la Paix". Ĉiuj scias, ke tiu organo asignis al si kiel celon, viglan kaj senkompromisan propagandon kontraŭ milito kaj milita psikozo. Je la momento kiam oni parolas nur pri „malvarma milito"/tiom facile varmiĝebla/ĝia agitvorto estas: Kontraŭ milito per ĉiuj fortoj! En si, ĝi akceptas ĉiujn sincerajn pacifistojn, /krom la pacistoj"kuniklhaŭtaj"/ de religiaj militrezistantoj ĝis la anarkistaj kontraŭmilitistoj.

Inter tiuj eblaj, ĉiuj rimedoj, C.N.R.G.O. nune reliefiĝas unu specialan: ĝi organizas "referendumon", kiun devus partopreni milionoj da gecivitanoj. Al ili ĝi proponas la tri jenajn demandojn: 1./ Ĉu vi konsentas, ke ĉiuj landoj, inkluzive la via, rezignu la militon, kiel "rimedon" por solvi internaciajn konfliktojn, kiaajn estos ties preteksto aŭ "pravigo"? 2./ Ĉu vi konsentas, se plej-multo jese respondas la antaŭan demandon, ke estu postulata, solidareco kun la ceteraj popoloj, la detruo de ĉiuj militiloj: teraj, maraj kaj aeraj armeoj kaj armiloj atomaj, kemiaj k.bakteriaj en ĉiuj landoj, inkluzive la via? 3./ Ĉu vi konsiderus kiel perfidulojn al ilia lando kaj al homaro, la registarojn de tiuj landoj, inkluzive la vian, kiuj kulpigus sin ne efektivigante sian tujan senarmigon propran, se la plejmulto en la mondo decidus tiele?

Kiu civitano, kiu homo en la mondo la saĝon ne perdinte, povus respondi tiujn tri demandojn aliel ol JESE? Ŝajnas, ke la organizintoj de tiu referendumo devus ricevi, ne centojn, ne milojn, ne centmilojn da respondoj, sed milionojn. La nepra devo de ĉiu konscia homo estas, ne nur respondi, sed kolekti subskribojn ĉirkaŭ si. Facila tasko, facila agitado, facila maniero pripensigi la personojn, kiuj ĉirkaŭas nin, pri plejgrava kaj angora demando, kiu staras nun antaŭ la homaro!

Kelkaj eble grumblos: "Al la diablo! Kian valoron havos tia "referendumo"? Estas privata afero! La registaroj ja mokas pri tia voĉdonado, kiu havas absolute nenian oficialecon!"

Minuton, k-do. Grumblulo! Atentu! Kompreneble, la afero havas nenian oficialecon! Ĉu tamen ĝi estas senvalora? Evidente, jes, se nur kelkcentoj da personoj respondos! Sed, se C.N.R.G.O. povas diri: Jen, ni parolas en la nomo de X-milionoj da personoj: jen la pruvo, jen estas iliaj bultenoj! Ĉu la "oficialuloj" ne ŝatos siajn orelojn? Ĉu ili ne ektimos la decidon de la neoficialuloj? Kaj memoru, kara Grumblulo, ke timo estas ofte komenco de l saĝo!

Do gek-doj, lasu grumbli Grumblulon! Vi partoprenu en la granda voĉdonado kontraŭ milito. Tuj petu referendumilon de C.N.R.G.O.: en uzino, en oficejo, en kluboj, kolektu subskribojn. Ni montru al la kelkcent-

oj da kanibaloj,kiuj revas nur pri „gloro",batalkampoj,kaj...dividendoj,ke ni estos kelkaj milionoj por reenglutigi al ili iliajn heroajn prikantojn kaj standardojn!

Charles DESPEYROUX

Rim.de la red.: Per ĉi alvoko fine ankaŭ SAT-amikaro klare montras al ni,ke gi estas preta sincere organizadi komunan batalon de ĉiuj fortoj por la defendo de la mondpaco.

Ni kredas,ke estus tre utila, ke krom la francaj gek-doj ankaŭ multaj eksterlandaj petu ĉi referendumilon ĉe: Comité national de Résistance á la Guerre et á l'Oppression, Sekr.:Emile Rauchet,AUBERVILLE-sur-Mer /Calvados/Francio.Ne forgesu citi SAT-amikaron kaj kolektu multajn subskribojn.PER ESP-O AL PACO!

## HUNGARAJ GEK-DOJ NE ESTAS PLU IZOLITAJ

pri tio atestas jena letero,kiun responde ricevis nia redakcio:

„...Vi eraras,kiam vi skribis,ke nia movado estas izolita.Ni havas kontakton kun nia MEM-peranto,k-do Pál Balkányi kaj el nia urbo gis nun 9 gesamideanojn varbis mi kiel abonantojn por la PACO.Bedaŭrinde la ekz-ojn ni ricevas neregule.

Mi bone konas vian bonegan cirkuleron LA PACDEFENDANTO-n.Mi bone rememoras ankoraŭ pri via artikolo novjara,kiam vi kuraĝon kaj sukceson deziris por la jaro 1955.

En nia urbo funkciis loka grupo de Hungarlanda Esperanto Asocio gis 1951,kie ni arangis kursojn, ekspoziciojn./Julio Baghy gvidis ĉe ni kursojn/.La loka grupo arangis la 3an Sudhungarlandan Esp-o Konferencon en 1950,kiam en nia lando jam neplu estis landaj kongresoj.

Vi skribis,kiel vi partoprenis la likvidan kunvenon en Praha, kie vi,preskaŭ sola esperantisto kuraĝis stari kontraŭ tiu hontinda decido,- mi estas konvinkita pri tio ke vi reprezentis la opinion de la plimulto de vialanda esperantistaro!

Kolektu plu la perditajn šafojn - ke mi citu viajn vortojn - kaj tenu alten la forjetitan standardon! Elkore mi deziras al vi sukceson por via Tutštata kunveno de esperantistaj pacdefendantoj!

Mi esperas,ke kelkaj gekamaradoj,inter ili k-do.Balkányi - ankau povos partopreni viajn kunsidojn.

Mi jam skribis al k-do.P.Balkányi,ke en 1955 ankaŭ ni,hungaraj MEM-anoj eldonu minimume unufoje PACO-n! Mi šatus scii, kion da ekzemplerojn ni devus presi aŭ multobligi,por ke mi povu elkalkuli ilian koston.Ekscionte tion,ni klopodos malfermi la vicon de tiuj,kiuj volonte donus municion por celo: PER ESPERANTO POR LA MONDPACO!

Mi ricevis salutkarton el Budapest,okaze de la 64 naskiĝtago de Julio Baghy,kie partoprenis ankaŭ k-do.K.Kaloczay kaj multaj el la perzistaj esperantistoj.

Espereble ankaŭ ni povos iam arangi tutštatan kunvenon por hungaraj esperantistaj pacbatalantoj,sed antaŭ ni estas ankoraŭ pli modestaj celoj: la eldono de PACO en 1955! Sed ni ne abdikas, kaj mi esperas,ke ni sukcesos aperigi unu numeron de PACO.

Dankante vian helpemon kaj konsilojn,akceptu miajn korajn salutojn:"

k-dino Julia TOTH
Hódmezővázárhely,Hung.

KOREKTIGO : Laste en nia raporto de ĉsl.mutitisto k-do.Fr.Kastner ni erare raportis,ke k-do.J.Baghy blindiĝis.Fakte li estis nur malsana kun la okuloj.

## INFORMO AL HRADEC KRÁLOVÉ

En via urbo funkcias de nun kiel perantino por LA PACDEFENDANTO k-dino.Lida REJTHÁRKOVÁ,Karla IV. čís.381,kiu zorgos pri la distribuado de L.P.en via urbo,akceptas jarabonojn kaj pagon por koresp. anoncoj,raportojn por la bulteno ktp. De tempo al tempo ši ankau arangos kunvenon por ĉiuj pacamikoj kie vi povos pritrakti ĉiujn,viajn problemojn.

## SAME POR LA URBO LIBEREC

kie funkcias k-do.František PYTLOUN Leninova 518/4a,LIBEREC I.

La red.

## NE ESTAS KAŬZO POR TIMO

Antaŭ nelonge aperigis k-do.Ján LAMAČKA el Trenčín/Slovakio/novan dupaĝan,presitan bultenon sub la titolo „NIA SPEGULO". Ĉi bultenon li prezentis al la partoprenintoj de la regiona Esp-konferenco okaziginta la 8-9.de januaro en Olomouc. Kompreneble,kelkaj gek-doj. tuj entusiasmiĝis,ĉe la penso, ke ni nun povus trovi konvenan okazon eldonadi bele presitan organon tutŝtatan. Ili proponis al nia redakcio kunfandiĝon de ĉiuj ĝis nun aperantaj kaj multobligitaj Esp-cirkuleroj,kiujn anstataŭigus „NIA SPEGULO".

Certe,ke neniu el niaj legantoj rifuzus ricevi anstataŭ la ĝis nun nur multobligitaj kaj ofte eĉ malbone legeblaj bultenoj,belan presitan gazeton. Sed multe pli serioze rigardas la aferon k-doj plispertaj! Unue ni rigardis la ELDONANTON: ĉe la piedo de tiu ĉi bulteno ni legas: Vydanie Agitačného strediska MERINA,n.p.TRENČÍN.-Kio estas "Agitačné stredisko"? Ĝi estas komitato,havinta la funkcion agiti por la balotoj.Kvankam en kelkaj grandaj urboj tiuj agitcentroj daŭriĝos sian ekziston kaj fariĝos propagandaj centroj, tamen estas tute ekster ilia tasko propagandi Esperanton kaj tio igas nin tute serioze dubi pri la daŭra vivkapableco de "NIA SPEGULO"helpe de tiu ĉi eldonanto.K-do. Ján lamačka eble tenas en tiu agitcentro respondecan funkcion el kies titolo li opinias povi helpi al nia movado. Vere ni dezirus al li daŭran sukceson,sed ni timas,ĉu li ne sentos sin devigita tuj ĉe la plej eta kontraŭdiro de "El Supre" ĉesi ĉian pluan eldonadon - - kaj poste ni havus nek la "SPEGULON", nek la multobligitajn ĝis nun cirkulerojn! Ni do preferas iom atendi,ĝis kiel la afero evoluiĝos.Intertempe ni petis k-don Lamačka,ke li klopodu por ni eldoni almenaŭ 2 ĝis 3 n-ojn de la oficiala organo de MONDPACA ESPERANTISTA MOVADO: "PACO",por konvinkiĝi nin pri la pluraj eldoneblecoj.Plue ni proponis al la membroj de la en Olomouc fondita Tutŝtata Konsulta Komitato ke ĝenerale decidu pri tiu afero nia TUTŜTATA KUNVENO DE ESPERANTISTAJ PACDEFENDANTOJ EN OTROKOVICE.

Ni tute aprobas la pluan aperadon de "NIA SPEGULO",ĝi estu al dispono por la ĉeĥoslovakaj espistoj,same kiel la ceteraj aperantaj cirkuleroj kaj eble la Tutŝtata Konsulta Komitato ĝin uzu kiel sian oficialan informilon. Tiamaniere ni almenaŭ akiros sperton pri ĝia vivkapableco. La titolo"NIA SPEGULO"estas neniondiranta por la nuna situacio kaj ni certe,ĉe eventuala pliposta kunfandiĝo tute ne konsentus rezigni nian ĝisnunan titolon "LA PACDEFENDANTO".Nia organo jam havas sian gloran tradicion,estas legata de ĉiuj progresemaj ĉeĥosl.esperantistoj kaj multe ŝatata de ĉiu eksterlanda abonanto,dume N.S.estas nekonata komencanto.

Nia redakcio ricevis kelkajn avertajn leterojn de abonantoj,kiuj esprimas sian timon aŭ zorgon, ke N.S.klopodas enpenetri nian movadon por konkuri ĝin. Tiaj kaj similaj zorgoj de niaj gek-doj estas tute senobjektaj kaj sen kaŭzaj.Vi devas konsciiĝi,ke pacmovado havas nenian konkuranton!

Ĉiuj,niaj legantoj estas firme koncentrigitaj ĉirkaŭ LA PACDEFENDANTO.Ni baldaŭ atingos la duan milon da abonantoj krom la "PACO" ktp.,kiujn ni ankaŭ distribuas. Niaj legantoj jam konvinkiĝis pri la sola kaj ĝusta vojo,kiun ni marŝas kun la firma konscio pri nia baldaŭa venko.Nia organo plene kaj pleje kontentigas ĉiujn legantojn.Pri tio atestas stokoj da leteroj,kiujn nia redakcio ĉiu tage ricevas krom la amasa aligado de novaj abonantoj.Krom tio,nia redakcio daŭre rezervas centojn da abonantoj por la "PACO",kiujn ĝi ne povas kontentigi,ĉar "MEM" nesufiĉas tiom da ekz.al ĈSR liveri Estas januaro.la mono nur fluas al nia redakcio.Niaj legantoj ne plu atendas,sed antaŭpagas sian ŝatatan informilon jam tuj ĉe la jarkomenco por plifaciligi nian laboron.Krome necesas vidi nian rubrikon"MUNICIO POR NIA BATALO", kiu ankaŭ klare respeguliĝas la aktivecon,intereson kaj entusiasmon,kiun dediĉas niaj gek-doj por sia afero! Do kvietiĝu,karaj timemuloj!Ni trankvilkonscience povas renkontiĝi kun ĉia ajn konkuranto kaj ni eĉ bonvenigas tian okazon,ĉar tio nur pli ankoraŭ povas antaŭenpuŝi nian movadon! R.B.

## K O R E S P O N D I  D E Z I R A S :

K-dino.Julia ZAKOPČANOVÁ,Závod mostárna VŽKG,OSTRAVA 10,Ĉeĥoslovak. kun ĉiuj landoj kaj interŝ.p.m.
K-dino.Věra MASNICOVÁ,Čujkovova 32/90,OSTRAVA-Stalingrad,Ĉeĥoslov. kun ĉiuj landoj kaj interŝ.p.m.
K-do.Karel VALA,Zahradní č.1,OSTRAVA I.Ĉeĥoslovakio,kun ĉ.landoj kaj interŝangas il.p.k.kaj p.m.
K-do.Borislav Angelev VELEV,Stalin str.No.5,GOCE DELĈEV,Bulgario,serĉas kiel instruisto por sia 50 mem-bra grupo korespondantojn el ĉ.l.
K-do.Dojĉo Kolev KERMEKĈIEV, Ŝar planina 32,SOFIA,Bulgario,kun ĉiuj landoj pri paco kaj kinomatografio
K-do.Hristo BOLTAĜIEV,str.Gopra hi-sas 7,KOLAROVGRAD,Bulgario, kun tutmonda gejunularo.
K-do.Georgi NAJDENOV,Institut"P.Beron",KOLAROVGRAD,Bulgario,kun gejunularo de ĉiuj landoj.
K-do.Lubĉo PETROV,Institut"P.Beron" KOLAROVGRAD,Bulgario,kun gejunuloj.
K-dino.Jiřina HODROVÁ,Libušská 635, MODŘANY u Prahy,Ĉeĥoslovakio,interŝangas il.p.k.kun ĉiuj landoj.
K-do.Mizumo-Hidezi,Muya-tyo,NARUTO, Japanio,telegrafisto,ano de Japana Komunista Partio,pri pacaj kaj lab. problemoj.
K-do.F.MORAVEC,Twedterholz No.15, FLENSBURG-MURWIRK,Germanio,pri infan eduko kaj gepatraj problemoj.
K-do.Leif STORM,Andreas Bjørsgade 23,KOBENHAVN,Danlando,pri soc.kaj lab.temoj,kolekt.p.m.
K-do.Franz MAYER,Hartungsstrasse 14,ELLRICH/Südharz,Germanio D.D.R.pri pacmovado ktp.interŝangas p.m.
K-do.Josef VANĚK,Letenská č.7, PRAHA XII,Ĉeĥoslovakio,kun ĉ.l.
K-do.Zdeněk SAMEK,Čajkovského č.41,OSTRAVA-Hulváky,Ĉeĥoslov. kun ĉiuj landoj pri ĉiuj temoj.
K-do.Břetislav ČAN,Vodní č.257, VÝŠKOV,Ĉeĥoslovakio,interŝang. il.p.k.kaj p.m.
K-do.Alois ZABLOUDIL,Vodní 283, VÝŠKOV,Ĉeĥoslovakio,interŝang. il.p.k.kaj p.m.
K-do.Murgin-Canko,Kvart.Malĉika 41,SOFIA-29,Bulgario,pri paco.
K-do.Géza HAUPTRICHT,Str.F.Satnu 8,BATA-MARE,Romanio,kun ĉ.l.
K-do.Cor de WAART,ŝangis adreson kaj loĝas nun:Budilova č.23, PLZEŇ,Ĉeĥoslovakio.
K-dino.L.BOČKOVÁ,Kamenná 9,BRNO Ĉeĥoslovakio,speciale kun USA, Svedio,Francio kaj Japanio.
K-do.Vasil Gerov GEORGIEV, Pod. 45280,ST.DIMITROV,Bulgario,per il.p.k.kun ĉiuj landoj.
K-do.Boris G.TOPALOV,pod.60740, SLIVEN,Bulgario,pri ĉiuj temoj kun ĉiuj landoj.

## M U N I C I O  P O R  N I A  B A T A L O

| | | | |
|---|---|---|---|
| K-do.V.Horák-Karlovy Vary... | 5.-Kčs | K-do.J.Ešpandr-Strašice.. | 2.50Kčs |
| K-dino.F.Fojtíková-BRNO..... | 1.- " | K-dino.M.Rajnyšová-PRAHA. | 3.- " |
| K-do.A.Trombala-Bohumín..... | 5.- " | K-do.E.Spaček-Ostrava.... | 3.- " |
| K-do.V.Sládeček-Karviná..... | 3.- " | K-do.S.Chaloupka-Ostrava. | 5.- " |
| K-do.J.Novák-Topolná........ | 2.- " | K-do.J.Kuzník-Opava...... | 3.- " |
| K-do.V.Malý-Hořice v Podkrk. | 5.- " | K-do.K.Vízek-Klatovy..... | 5.- " |
| Serganto Ešpandr-Strašecí... | 3.- " | Soldato P.Švec-Ostrava... | 3.- " |
| K-do.J.Stebel-Bystřice n/O.. | 8.- " | K-do.J.Balay-Brno........ | 10.- " |
| K-do.R.Bystřický-Plesná u Ch | 8.- " | K-do.A.Baláš-Brno........ | 13.- " |
| K-do.S.Caletka-Nový Lískovec | 3.- " | K-do.V.Špůr-Doksy u M.j.. | 15.- " |
| K-do.M.Rybín-Partyzán.Lupča. | 5.- " | K-dino.M.NetoličkováPRAHA | 3.- " |
| K-do.K.Janda-Králupy n/Vlt.. | 8.- " | K-dino.E.Kučerová-Skačany | 15.- " |
| K-do.B.Novotný-Hlušovice.... | 5.- " | K-do.J.Valeš-Praha....... | 3.- " |
| K-do.B.Munzar-Hořice v Podkr. | 3.- " | K-do.A.Stanura-Ostrava... | 3.- " |
| K-do.F.Hejkenwälder-Prostějov | 5.- " | K-do.K.Švarc-Želiv I..... | 8.- " |
| K-do.Ing.Řebíček-Havlíč.Brod | 5.- " | K-do.Z.Řezáč-Svárov...... | 5.- " |
| K-do.K.Svoboda-Mlýny,Kytlice | 3.- " | K-do.V.Wertner-Mlýny,Kytl. | 3.- " |
| K-do.P.Trombík-Skřečon...... | 8.- " | K-do.A.Kernel-Bohumín.... | 10.- " |
| K-do.J.Řehoř-Ostrava VIII... | 8.- " | K-do.E.Belda-Šumburk..... | 5.- " |
| K-do.K.Horák-Třebič......... | 3.- " | K-do.I.Sedlák-Cejkov..... | 8.- " |
| K-dino.A.Valjanová-Galanta.. | 20.- " | K-do.N.Kavenius-Finlando | 12.- " |

Al ĉiuj gek-doj ni elkore dankas.La ceteraj sekvu !

## NIA MOVADO EN ČEĤOSLOVAKIO

OLOMOUC, la 8-9.de januaro okazigis komuna laborkonferenco de la regionoj Ostrava kaj Olomouc Partoprenis ĉirkaŭ 200 gek-doj. el diversaj lokoj, eĉ el Slovakio. Ceestis ankaŭ k-do. Hromada, prof. Kožený kaj aliaj konataj aktivuloj. Ceestis ankaŭ reprezentanto de la Uzina Konsilantaro, k-do. Žák. Antaŭ la konferenco predikis esp-e k-do. paroĥestro Pokorný, kiu travivis 4 jarojn en germanaj koncentrejoj. La prediko okazis en la katolika preĝejo de Sankta Miĥaelo. Sub la prezido de k-do. d-ro. Mohapl la laborkonferenco atingis tre altan nivoon. K-do J. Lamačka el Slovakio, prezentis la plejnovan rezulton, kiun Esperanto atingis ĉe UNESKO, disponigante ĝin al la ĉeestantoj sur presita folio Oni pritraktis ankaŭ la arangon de nia Tutŝtata Kunveno, pri kio legu detale, interne de tiu ĉi cirkulero.

ČERVEŇANY pošta SIRK, al ĉi tie translokigis nia k-do. J. Trombitáš kaj jam li organizas kurson por komencantoj. Baldaŭ li informos nin pli detale.

HRADEC KRÁLOVÉ, en du vitrokestoj, ĉe omnibushaltejo kaj kinejo "JAS" ni prezentas al la publiko la rezolucion pri Esp-o de UNESKO el Montevideo. La 26.1. estis nia jarkunveno. Partoprenis 15 malnovaj membroj. Regulaj kunvenoj okazas ĉiu ĵaŭde de 19.45 en ĉambro n-o. 244 teretaĝe de nia stacidomo. Funkcias kurso kun 5 lernantoj.

KARLOVY VARY, ankaŭ ĉi tie reaktiviĝas nia movado. K-do. Vl. Horák jam organizas kurson ĉe la sindikato. Instruos k-do. P. Tichota.

LIBEREC, nia rondeto sub gvido de k-do. Fr. Pytloun ankaŭ jam kontaktas kun la regiona packomitato, kiu promesis inviti niajn reprezentantojn al sia proksima kunveno, kie k-do. Pytloun prelegos el gazeto "PACO".

SVIT, en Slovakio nun funkcias 3 oficiale aprobitaj niaj rondetoj nome: en Prakovce, Bratislava kaj Svit. En la lasta, ĝi konsistas plejparte nur el k-dinoj. Sed tiuj povas esti ekzemplo por multaj k-doj. La rondeto jam eldonis la 3an n-on. de interese ekipita dulingva bulteno por slovakaj esperantistoj, kiujn ĝi konstante vokas al aktiveco kaj kunlaboro. La rondeton gvidas k-dino. Julia Kaczerová.

PLZEŇ, finiĝis kurso por komencantoj kun 6 personoj. 3 jam aliĝis kiel membroj ĉe nia Junularo. Nova kurso komenciĝos en februaro. Ĝis nun 17 personoj aliĝis. De la 14.1. funkcias kurso kun 8 lernantoj. Instruas MUDro. J. Černý. Nia Junularo kunvenas ĉiu vendrede de 18.30 kaj komunaj konversaciaj vesperoj estas ĉiu merkrede de la 19a horo en nia klubejo: restoracio "U Fišerů", Sedláčkova n-o. 39.

TRENČÍN, ĉi tie sukcesis k-do. Ján Lamačka eldoni presitan 2 paĝan Esp-lingvan bultenon sub la titolo "Nia Spegulo". Estus dezirinda, ke li sukcesu eldonadi daŭre tiun ĉi bultenon.

## EKSTERLANDAJ ABONANTOJ ATENTU !

Niaj bulgaraj gek-doj. pagu sian jarabonon por 1955, t.e. 10 levojn al nia peranto: Borislav Angelev VELEV, Stalin 5, GOCE DELČEV. Por ordinara koresp. anonco necesas pagi 2 levojn.
Hungaraj gek-doj. abonpagu ĉe K-do. Pál Balkányi, per adr. MAGYAR NEMZETI BANK, Fiókiroda, BUDAPEST-54. Jarabono: 12 ft.

Gek-doj. el Germanio-DDR, abonpagu ĉe k-do. Helmut Löffler, Theaterstr. No.1, MITTWEIDA/Sachsen.
En Svedio eblas abonpagi ĉe k-do. Karl Kvist, Box 109, DEJE.
Rekte vi povas pagi al nia redakcio per sendo de egalvaloraj Esp-libroj kaj broŝuroj. Speciale ni ŝatas akcepti "BAPTO DE CARO VLADIMIRO", kiu estas en via lando aĉetebla.

Eldonis: Závodní klub ROH, odb. ESPERANTO, TATRA, n.p. K O P Ř I V N I C E
Redaktis: k-do. Rud. BURDA, Palackého nám. č. 6, P L Z E Ň , ČEĤOSLOVAKIO.